

Jakob Dirnböck ,
De la Dachstein-mont'

tradukita de Karl Franz

De la Dachstein-mont' – alta aglo-tron'
Ĉis la Venda land' ĉe la bord' de l' Sav',
De la Mürz-torent' en alpejkanton'
Ĝis la vinberland' ĉe la Drav'
Ĉi belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'!

Kie saltas ĉam' sur la roka mur',
Grimpas la ĉasisto en arbar',
Kie paŝtistin' jodlas pro plezur',
En ĉieltuŝanta altmontar'.
Ĉi belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'!

Kie per labor', fajro kaj martel'
Feron gajnas hom' el la sankta ter',
Kier abiar' kreskas al ĉiel',
Kaj eĉ spitas al veter-koler':
Ĉi belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'!

Kie la fidel' de germana gent',
Kredo, virto kaj la vira glor' -
Sur knabina vang' la hontema sent',
Ĉiam restas la mastrin-fervor':
Ĉi belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'!

*Traduko de la Germana poemo "Hoch vom Dachstein an" de JAKOB DIRNBÖCK (*1809 – †1861) en Esperanton de Karl Franz.*

Arg-522-1032 (2010-03-03 10:30:03)

La tradukon verkis Karl Franz, ĝi aperis en la revuo "Heroldo"- n-ro 47 (804) de l' 25° de Novembro 1934. La himno estas kantata laŭ la melodio, kiun verkis Ludwig Carl Seydler (1810 – 1888). Ĝi estas la himno de la aŭstria federacia lando Stirio. Vidu ankaŭ la retejon www.literaturo.dk, kiun kunmetis s-ro Lars Kromann el Fakse, Danio. Rigardu la retejon <http://www.literaturo.dk/dachstein.htm>.

La kanto enhavas entute dek strofojn, el kiuj Karl Franz tradukis nur tiujn ĉi kvar.